

Christian Fürchtegott Gellert,
La kamparano kaj lia filo

tradukita de Hans Erik Jensen

Johano, juna kamparan'
 post eksterlanda por la san'
 vojaĝo kun nobela fil'
 al sia patra domicil'
 revenis kaj en la vilaĝ'
 fieris li pro la vojaĝ';
 por ĉies ĝoj' rakontis li
 pri eksterlando pli kaj pli.
 Sed kvankam parto estis ver',
 mensog' abundis sen moder'.
 Vojaĝo du kapablojn donas:
 Mensogas ni kaj fanfaronas!
 Ne malpli lerte Hans mensogis
 ol besto kuras, birdo flugis.
 Monato pasis, tiam li
 pro certa grava komisi'
 de l'patro nun en kompani'
 promenis al la urb' kun li.
 Foriris ili en maten'

...

Christian Fürchtegott Gellert,
Der Bauer und sein Sohn

Ein guter dummer Bauerknabe,
 Den Junker Hans einst mit auf Reisen nahm,
 Und der, trotz seinem Herrn, mit einer guten Gabe,
 Recht dreist zu lügen, wiederkam,
 Ging, kurz nach der vollbrachten Reise,
 Mit seinem Vater über Land.
 Fritz, der im Gehn recht Zeit zum Lügen fand,
 Log auf die unverschämteste Weise.
 Zu seinem Unglück kam ein großer Hund gerannt.
 "Ja, Vater", rief der unverschämte Knabe,
 "Ihr mögt mirs glauben oder nicht:
 So sag ich Euchs, und jedem ins Gesicht,
 Daß ich einst einen Hund bei — Haag gesehen habe,
 Hart an dem Weg, wo man nach Frankreich fährt,
 Der — ja, ich bin nicht ehrenwert,
 Wenn er nicht größer war als Euer größtes Pferd."
 "Das", sprach der Vater, "nimmt mich wunder;
 Wiewohl ein jeder Ort läßt Wunderdinge sehn.
 Wir, zum Exempel, gehn itzunder,
 Und werden keine Stunde gehn:
 So wirst du eine Brücke sehn
 (Wir müssen selbst darüber gehn),
 Die hat dir manchen schon betrogen
 (Denn überhaupt solls dort nicht gar zu richtig sein);
 Auf dieser Brücke liegt ein Stein,
 An den stößt man, wenn man denselben Tag gelogen,
 Und fällt, und bricht sogleich das Bein."

...

kaj vidis hundon dum promen'.
 Feliĉe ligis ĝin kateno,
 minacis ĝi kun mordmieno.
 "Jen monstro!" diris Frederik'
 por ĝia bruo kaj mimik'.
 "Ho, bagatel'!" respondis Hans,
 "pasintan jaron fore trans
 la lim' mi grandan hundon vidis,
 kaj vere mi pro ĝi ne ridis!
 Mi ĉe Stetino ĝin renkontis;
 ektimis mi, sed ĝin alfrontis!
 Stetino - eble kredas vi:
 al Kopenhag' egalas ĝi,
 Ho ne! al mi nur fidu vi -
 deköble granda, eble pli!
 La hundo, kiun vidis mi -
 al mia vorto kredu vi -
 almenaŭ estis - ho, fatal'! -
 egale granda kun ĉeval'!"
 De l'patro sonis la respond':
 "Mirinde - kvankam en la mond'
 tre strangajn aĵojn vidas ni;
 okulon propran fidas ni
 apenaŭ - ankaŭ same pri rakont'.
 Ekzemple venos baldaŭ ni al pont'.
 Ni ĝin atingos post malpli ol hor'

...

Der Bub erschrak, sobald er dies vernommen.
 "Ach", sprach er, "läuft doch nicht so sehr.
 Doch wieder auf den Hund zu kommen,
 Wie groß sagt ich, daß er gewesen wär?
 Wie Euer großes Pferd? Dazu will viel gehören.
 Der Hund, itzt fällt mirs ein, war erst ein halbes Jahr;
 Allein das wollt ich wohl beschwören,
 Daß er so groß, als mancher Ochse, war."
 Sie gingen noch ein gutes Stücke;
 Doch Fritzen schlug das Herz. Wie konnt es anders sein?
 Denn niemand bricht doch gern ein Bein.
 Er sah nunmehr die richterische Brücke,
 Und fühlte schon den Beinbruch halb.
 "Ja, Vater", fing er an, "der Hund, von dem ich redte,
 War groß, und wenn ich ihn auch was vergrößert hätte:
 So war er doch viel größer als ein Kalb."
 Die Brücke kömmt. Fritz! Fritz! wie wird dirs gehen!
 Der Vater geht voran; doch Fritz hält ihn geschwind.
 "Ach Vater!", spricht er, "seid kein Kind,
 Und glaubt, daß ich dergleichen Hund gesehen.
 Denn kurz und gut, eh wir darüber gehen,
 Der Hund war nur so groß, wie alle Hunde sind."

...

- al ni neevitebla koridor'.
 Sur ĝi troviĝas granda ŝton';
 al ni ĝi rompas kruron sen pardon',
 se ni mensogis dum la tag' -
 jen vero - kaj neniel blag'!"
 Aŭdinte tion tuj la fil'
 ektimis kaj pro maltrankvil'
 la sango kuris al la kap',
 li ŝvitis pro angora frap'.
 Li kriis: "Paĉjo, kara vi,
 tro forte ne rapidu ni!
 Por maljunulo la veter'
 tre varma estas ja danĝer'!
 La forton oni devas ŝpari
 kaj pripensadi, kion fari.
 Se pri la hundo pensas mi,
 ne tiom granda estis ĝi,
 kiom rakontis mi al vi,
 sed certe estis ĝi malpli -
 egaligis eble kun bovin',
 sed tamen hundo de kulmin'!"
 Denove ili laŭ la voj'
 iradis, sed sen granda ĝoj',
 ĉar la junulon la rakont'
 maltrankviligis, kaj la pont'
 konfuzon faris pli kaj pli,
 kaj pro la timo cedis li;
 ni ĉiuj ja volonte savas
 la krurojn, se ni sanajn havas.
 Johano tial pro la krur'
 elkriis: "Paĉjo, vorton nur!
 Mi pensas daŭro pri la hundo,
 sed pro la vero ĝis la fundo
 mi diras al vi en konfid':
 Egaligis ĝi nur kun bovid'."

Du mußt es nicht gleich übelnehmen,
 Wenn hie und da ein Geck zu lügen sich erkühnt.
 Lüg auch, und mehr als er, und such ihn zu beschämen:
 So machst du dich um ihn und um die Welt verdient.

Sed baldaŭ en la horizont'
 videbla estis nun la pont'.
 Por timo fluis al Johan'
 laŭ lia haŭto ŝvitfontan'.
 Nun kaptis li pro la efiko
 la patron forte je l'maniko,
 kaj kriis li en malespero: +
 "Ho, paĉjo, nun mi en sincero
 onfesas, ke mi ŝercis nur;
 kaj tio, kion por plezur'
 rakontis pri la hundo mi,
 ja estis nura fantazi'.
 Similis ĝi ja laŭ la ver'
 la hundojn sur la hejma ter'."

Transpasis ili sen danĝer'
 la ponton de mensog' kaj ver'.
 La fil' ne pro la fanfaron'
 la kruron rompis sur la ŝton'.
 Sed velkis lia fantazi',
 kaj ĉe la vero restis li.
 Li ne similis plu al dando
 estinta en la eksterlando.

...

...

*Traduko de la Germana poemo “Der Bauer und sein Sohn” de CHRISTIAN FÜRCHTEGOTT GELLERT (Kristiano Timodio Gellerto, *1715-07.04 – †1769-12-12) en Esperanton de HANS ERIK JENSEN (†1973-06-18) en 1951-06-07.*

Arg-536-1072 (2013-02-10 19:30:56)

Tiu ĉi traduko estis publikigita en la revuo “Monataj Informoj” de Silkeborg Esperantoforening (Danujo).

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas CHRISTIAN FÜRCHTEGOTT GELLERT (Kristiano Timodio Gellerto, *1715-07.04 – †1769-12-12).*

Arg-536-1068 (2013-02-10 19:41:20)

Pri la verkinto vidu ankaŭ la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Christian_FFärchtegott_Gellert resp. la germanan version http://de.wikipedia.org/wiki/Christian_FFärchtegott_Gellert.